

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA · ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 ÚSONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN · BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfí Dalmau, Isidre Torrents

TRES MOMENTS DEL LLENGUATGE

Dos són els factors essencials i d'actuació constant que intervenen en la formació de la llengua literària: els escriptors i el poble. En aquells resideix el poder de la creació del llenguatge; són la força individualitzadora de la seva vida. En aquest jau la funció, la facultat de conservació i d'evolució del llenguatge; és la força socialitzadora de la seva vida. Per emprar els termes de Vossler direm que l'escriptor i el poble representen els dos únics moments essencials en la vida d'una llengua. En el moment de néixer, de produir-se la llengua és quelcom actiu i individual; és el moment del progrés absolut. En el moment d'acceptar i propagar la massa del poble les creacions individuals, la llengua és una activitat col·lectiva, basada, però, en una passivitat individual; és el moment del progrés relatiu. En el primer moment la llengua és creació, és Estètica; en el segon, és evolució, és Història. Entre el primer i el segon moment pot haver-hi un altre: el de l'acceptació totalment passiva de les creacions individuals per la massa. Aquest moment, però, és precisament el punt mort, un moment que només existeix teòricament, car en la vida de la llengua només pot donar-se una passivitat parcial, no mai, però, una pura passivitat.

Doncs, bé: l'intent teòric de donar realitat a aquest tercer moment, l'esforç per afermar aquest punt mort, que de vegades vé a interposar-se entre els dos moments essencials de la vida de la llengua, és precisament la tasca de la preceptiva gramatical, la qual tendeix per naturalesa a fixar, a prolongar, si més no, el moment de passivitat, el punt mort, en la vida de la llengua. El treball del preceptista lluita, doncs, amb evident desavantatge contra la doble pressió de la força de la creació individual i la força de l'evolució col·lectiva, constants en tota llengua viva.— M. DE MONTOLIU (De «La Ven de Catalunya»).

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per al
femeni

heroino, reĝino
katino, leonino

O

terminació
substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerç)

A

terminació
adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb
(infinitiu)

kompreni
labori
komerçi
(comerçar)

E

terminació
adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condi-
cional

U

mode impera-
tiu o subjunc-
tiu

Mi skribas
Jo esric

skribis
escrivi

skribos
escriuré

skribus
escriuria

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo esric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gitaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

XIII.^a Kongreso de K. E. F.

XII.^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Santa Coloma de Farnés 23-25 Majo 1926.^a

La nombro de verkoj ricevitaj, la merito de multaj el ili, la diverseco de landoj el kiuj ili venis, signifas promeson de sukceso por niaj proksimaj Floraj Ludoj. La bela landa scenejo kie okazos la koncerna solenaĵo, kaj la famo atingita de niaj Konkursoj ĉie en Esperantujo, certe venigos kelkajn eminentajn samideanojn el pluraj landoj. — Kiu estas la poeto gajnonta la Naturan Floron? Kiu estos la Reĝino? Kiuj verkoj, kiuj aŭtoroj estas premiataj? Jen nunaj demandoj en multaj esperantistaj animoj en ĉiuj landoj. Internaciaj Floraj Ludoj por Esperanto kaj Esperanto por Internaciaj Floraj Ludoj, por eterno edziĝis en la V^a Universala Kongreso en Barcelona, kaj floras kaj fruktas por gloro de ambaŭ: de la lingvo de Zamenhof kaj de la Esperantista verkistaro.

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.

Oriento-Okcidento

«La Orienta Lumo», de Koreujo, alsopire en sia novembra numero, alude al la nuna bela florado de esperanta verkado de Oriento al Okcidento kaj ĉefe al la publikado de la granda revuo «Oriento» el Harbin; diras: «Gazeto "Okcidento" ankoraŭ ne aperis».

Karaj koreanoj, — Nia gazeto «Kataluna Esperantisto» pro sia avido al kunfratiĝo kaj lernado pri via mondo, estas via «Okcidento». Pro sia kunsentado de homaranismo estas la «Okcidento» de vi petata. Pro sia penado diskonigi la katalunlingvan popolon samkiel vi penas pri la korea nacio, estas «Okcidento».

La diskonigo de ĉiu nacio montras al la aliaj ke ĉiuj estas profunde samsentaj, sampensaj kaj, do, fratecaj. Estas nur supraĵaj, aspektaj, formaj, kulturaj diferencoj, multe pli grandaj inter individuoj ol inter nacioj; — pli imagaj ol realaj. La aforismoj «Kiu semas venton, rikoltos fulmotondron», «kia ago, tia pago», «Rido matene — ploro vespere», «Kio mia, tio bona», «Virino scias — tuta mondo scias», kiujn ni represas el via gazeto, k. t. a., estas komunaj al vi kaj al ni kaj al ĉiuj nacioj. Tiu fakto bone montras ke ni ĉiuj estas anime, spirite, kore, certe samecaj, unuecaj. Tial la konstato de niaj naciaj diferencoj povas esti nur plaĉo por niaj sentoj, kaj ne baroj kontraŭ paco interpopola. Kaj konscio pri tio povas efektiviĝi homaranismon, pacon kaj amon. Tion ni laŭte volas esprimi al la lando de mil lagoj: Finnlando, Nordo; al la lando de mil montoj: via bela Koreujo, de sereno matenfrua, Oriento; kaj al Sudo, — al ĉiuj homareroj en la mondo.

La popoloj neniam interbatalis pro malsamecoj, sed pro malkompreneoj kaj maljustecoj, pro ambicioj kaj egoismoj. Ke vi estas orientanoj kaj ni okcidentanoj tute ne estas kaŭzo kontraŭ paco kaj amo inter Oriento kaj Okcidento. Kaŭzo malbeninda komencas nur tiam kiam okcidentanoj volas okcidentigi, asimili, venki orientanojn, aŭ, male. La Historio montregas ke similaj kaj samlingvaj, similaj kaj samkulturaj kaj samreligiaj popoloj intermilitis; eĉ samfamiliaj, samdinastiaj nacioj interbatalis kruele, ŝakale. Tial la Majstro, apud la komuna lingvo, baze por certa paco, alsopiris homaranismon, justecon!

Akceptu, karaj orientanoj nian profundan ĝojon pri la progreso de Esperanto kaj ĝia interna ideo ĉe vi.

DELFI DALMAU

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

La Dimanĉo de la Rozoj

(Menciita en la XIaj Floraj Ludoj)

Mi volas fari al vi rememoron, rememoron el mia lando, kiun mi ne povas fortiri el la memoro dum tiuj ĉi tagoj de Printempo kaj de blindiga lumo.

Vizio de amo estas la fruktejo de Valencio.

Supreniru la *Mikaleť* on (1), la turo de niaj sopiroj kaj de niaj nostalgioj. .; supreniru tien, kaj viaj okuloj malfermiĝos plej malfermite, ĉar vi neniam havos sufiĉe vidante la belbrilegan mirindaĵon.

Ha, kiel ĝi estas bela! Senmezura ebenaĵo de verdeco kiu ĉirkaŭiras la urbon kaj aperas bruligita de blankaj punktoj kiuj kvazaŭblindigas la okulojn: ili estas la barakoj, kiuj ŝajnas sidantaj kolombinoj havantaj ĝojon kaj konsolon por la vidsento.

Tie travivas la *plugistoj*, la anaro el la fruktejo. La virinoj, blankaj kiel la paleco de la rizo; kaj la viroj, kun maŭra sango ĉe la vejnoj; ĉiam kurbitaj sur la tero, kiu neniam ripozas, malsaĝaj kaj senkonfidaj, havante ankoraŭ, la inklino al la pulvo kiun ili heredis el la maŭroj, kaj la algluiĝon al la kamparo kiu donas al ili la vivtenon.

Sed meze de tiu ilia krudeco, ŝajnas ke la ridoj de la suno penetras ilin ĝis la plej profundo el la animo, eligante el ili trajtojn de naŭva poezio, de dolĉega sento, kiel la ĉielkoloro ĉe la apero de la ektagiĝo.

Kaj unu el tiuj momentoj dum kiuj la popola animo foriĝas el la humila ĉiutaga vulgareco, estas la festo de la rozoj, la festo de la unua dimanĉo de Majo.

La fraŭloj kaj la fraŭlinoj atendas la alvenon de tiu tago kun la deziro de la junaĝo. Kaj la fruktejo sin vestas belorname por alhelpi al tiu festo de la koro.

Kiam apenaŭ tagiĝas kaj ankoraŭ ĉio ripozas en silento, la junulino kiu dormas en sia barako ekaŭdas gajridan muzikon kiu ŝin dolĉe vekas. Ĝi estas la *frumatenkantoj* kiujn kantas la fraŭloj tie ekstere.

Mi ne scias ĉu ĝi estas ĥimero mia; sed mi ne kredas ke ekzistas regalajo pli delikate amriĉa nek pli intima ol tiu kunkanti kantaĵojn al la amatino, kiu estas dormanta, por alvenigi ĝis ŝi la tonojn el la koro en la dolĉeco de la duonlumo, en la malprecizeco de la fermita fenestro, sen la kruda forto de la kanto plenvoĉa kaj proksime de tiu ĝin aŭskultanta.

Kaj la knabinoj ekvekiĝas iom post iom inter sonoj kiuj dorlotas la orelojn kaj versaĵoj kiuj ne havas ĝustecon pri la mezuro nek aliaj retorikaj

(1) *Mikaleť*, Ĝi estas la nomo kiun oni donas en Valencio al la sonorilejo de la Katedralo.

kanonoj, sed kiuj estas versentaj kaj plenaj de koloro, kun la bela malegaleco mem kaj kun la parfumo mem de la oranĝoj.

Eĉ ne estas bezone diri ke la voĉoj estas fortaj kaj malagordaj. Sed la pordo de la fenestro jam prizorgas formeti el ili la akrecon kaj konduki ĝis la oreloj de la fianĉino la puran akcenton de la simpla pasio, kiu kantas kantaĵojn kiel jenan:

Sub la oranĝarbo mia
Vi konfesis al mi amon;
kaj de tiam l' arb', pli dolĉaj
fruktofaras la oranĝojn.

Poste la muziko malproksimiĝas; la kantstrofoj alvenas pli malfortaj kaj pli malprecizaj...

La fraŭlino fortiras sin el la lito, kaj, malferminte la fenestron de la dormoĉambro, ŝi ekvidas la unuajn sunradiojn kiuj plenigas per amo kaj ĝojo la tutan fruktejon. La kampaj ventoj ŝajnas pli kontentaj ol iam; la malvarmeta aero forpasas postlasante malvarmojn de ĝojo, tre malproksime aŭdiĝas la urbaj sonoriloj, kaj penetranta aromo de vivo kaj de konsolo supreniĝas el la tero kaj disflugas tra la enaero.

La knabinoj elrigardante ĉe la pordo de la barako, ekvidas la pavimon ornamita per rozfolioj, tapiŝo el harmoniaj koloroj, kiu postlasas krudan aromon, esperodoron: en ĉiu barako kie estas junulino, vidiĝas la sama sopirporta florornamaĵo.

La tuta fruktejo aperas balzamigita de la rozoj disfoliigitaj, kaj ĉe ĉiuj flankoj vin ĉirkaŭas supreniĝante al la kapo, en naŭzoj de bedaŭro, la voluptaodoro, kiu ŝajnas himno de amo; delikata konfeso de la popola spirito, kiu ne scius eldiri per vortoj la tutan dolĉecon de sia ĝuo, ne forprenante al ĝi tiun instinkton de poezio kiun komunikas la kamparo kaj la suno de la lando.

Katalunlingve verkis
EDUARD L. CHAVARRI
Tradukis, kun permeso de la aŭtoro
JOSEP VENTURA

Pro... kaj Por...

Sukceso en Sudameriko estis la Esperantista Kongreso organizita de nia kataluna samideano, Inĝ. Santiago Gomis, en Montevideo. La plej gravaj ĵurnaloj en tiu granda urbo detale raportis la Kongreson, kiun aliĝis multaj societoj kaj grupoj el Argentino, Brazilo, Ĉilo, Urugvajo, k. a. Ni sincere gratulas nian amikon, kiu efike pioniras nian Movadon en tiuj vastaj landoj.

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

(daŭrigo)

§ 10. Zamenhof ĉerpis la radikojn, elektante ilin el la kulturlingvoj, en laŭeble pura kaj simpla formo. La saman metodon ni sekvas ĉiufoje, kiam mankas al ni iu vorto, kies ideo ne povas esti oportune dirita per la kunmetaĵo.

Sed ekzistas apud la internaciaj radikoj la internaciaj tipoj de kunmetaĵoj, kiujn oni ne povas diveni, se oni restas en mallarĝa sfero de unu nacia lingvo. Ekzemple:

f. *étoile de mer* = stelo de maro, r. *morskaja zvezda* = mara stelo,
i. *stella di mare* = stelo de maro, g. *Seestern* = marstelo,

tiuj kvar esprimoj egale signifas konatan maran animalon kvinpintan. Ankaŭ:

f. *La Vole Lactée* = vojo lakta, r. *Mleĉnyj Putj* = lakta vojo,
i. *Via Lattea* = vojo lakta, g. *Milchstrasse* = laktvojo.

Estus do kontraŭ la internacia principo la akcepto de tiaj vortoj, kiaj estas «asterio» kaj «galaksio», proponitaj de la sciencemuloj. Etimologie, la asterio = astrajo, la galaksio = laktajo, la ambaŭ el la helena lingvo.

§ 11. Ĉion, kio jam estas internacie uzata en scienco kaj tekniko, la lingvo tutmonda povas nur akcepti sensaŝe, sin klinante antaŭ la fakuloj, kiuj dum jarcentoj kaj jardekoj estis oferantaj por tio grandan penon. Tiel Zamenhof akceptis la hindarabajn kaj romajn ciferojn, la kalendaron, la latinidan abocon. Tiel Esperantistaro devas akcepti la ĥemian signaron, la natursciencan terminaron, la muzikan sistemon, ktp.

Sed por la fakoj, kie tia internacia terminaro ne ekzistas, ekz. por la juro, politiko, geografio, geologio, astronomio, mekaniko, konstruado, teknologio, maŝinado, komerco, bankado,... tie la terminaro en Esperanto estos ellaborita pofake, sur la scienca bazo, per kolektiva laboro de la spertuloj.

§ 12. Aglutinaj lingvoj (finna, tatara, japana, turka, baska, kc.) diferencas de la hindeŭropaj, semidaj kaj ceteraj fleksiaj lingvoj, per tio, ke en

ili la konstruaj elementoj ne ŝanĝas, kiam ili kombiniĝas (agluigas). Laŭ tiu diferenco ankaŭ Esperanto estas aglutina lingvo. Dank' al la aglutineco kaj al tio, ke niaj vortaroj entenas ĉiujn elementojn, estas eble deĉifri Esperantan tekston eĉ por tiu, kiu ne posedas la lingvon. Tial Zamenhof havis ideon presigi la radikaron sur unu folio, oportune sendebla en la koverto kun Esperanta letero, destinita al persono, kiu ne scias nian lingvon.

H. F. Höveler perfektigis tiun ideon de Zamenhof, eldoninte t. n. ĉefeĉojn. Nun ekzistas la ĉefeĉoj en 19 lingvoj.

§ 13. Frazo konsistas en vortoj. Vorto do estas ĉiu frazero. Estas du ĉefaj grupoj da vortoj: rilataj kaj esencaj. Rilataj vortoj ne bezonas finaĵon por esti uzataj en frazo, tamen ili akceptas finaĵon por formi esencajn vortojn, kaj ankaŭ povas servi kiel prefiksoj. Esencaj vortoj estas minime duementaj: ili konsistas en temo plus finaĵo.

La temo povas esti simpla radiko (unu elemento) aŭ obla radiko (pluraj elementoj). Ekz. en vorto *laktumo* estas tri elementoj, el kiuj la du unuaj formas temon (*laktum*) kaj la tria servas kiel finaĵo (*o*). Farado de la temoj estas regata de la regulo: difinanto antaŭ difinato. Ekz.

poŝhorloĝ = poŝa horloĝo

ĵartibr = ĵara libro

disromp = dise rompi

trograndig = troe grandigi

Ĉar je fino de esenca vorto, kiu ĉefas en frazo, staras finaĵo-o, tial neeviteble sekvis la regulo: la senceĉefa radiko staras je la fino. Efektive, oni nature analizas:

vaporŝipo = vapor-ŝipo = vapora ŝipo.

virhundo = vir-hundo = vira hundo.

Finaĵo-o fakte apartenas al tuta temo, sed ĉe la analizo ĝi ŝajne apartenas al lasta radiko.

Ĝenerala postulo de Esperanta temfarado konsistas en tio ke la senco de la kunmetita (plurelementa) temo ne estas nura sumo de la elementaj sencoj, sed ia nova speciala senco.

Ekzemple, la *pafilego* ne estas «granda pafilo», sed la kanono; la *rideto* ne estas «eta rido», sed la ridmieno; la *molanaso* ne estas «mola anaso», sed la ejdero; la *vortaro* ne estas nura «aro da vortoj», sed la leksikono.

Sufiksoj en temfarado rolas alie ol radikoj. Kelkaj el ili (an, ar, ec, ej, em, id, il, ing, ist, uj, ul) obeas la regulon: difinanto antaŭ difinato. Aliaj ĝin ne tute obeas. Ceteraj ĝin tute ne obeas (aĉ, eg, et, in, ĉj, nj), ĉar por ili estas aplikebla mala regulo: difinanto post difinato; ekzemple ni analizas:

domaĉo = aĉa domo.

buleto = eta bulo.

altega = ege alta.

birdino = ina birdo.

§ 14. Regulformeco de Esperanto kuŝas ĉefe en ĝia gramatiko: unuforma vortofarado per o, a, e, i, simpla verbosistemo kun simetriaj finaĵoj, temfarado per afiksaro, tabelo de korelativaj vortoj, pronomoj, nombroj.

Lastatempe oni atentis la regulecon ankaŭ de la radikaro; ekzemple, oni volas kompletigi jenajn seriojn:

geologo	geologio	(fiziologo)	fiziologio
fotografo	fotografio	(geografo)	geografio
astronomo	astronomio	(ekonomo)	ekonomio
delegi	delegacio	(konjugi)	konjugacio
varii	variacio	(situi)	situacio
deklari	deklaracio	(apeli)	apelacio
lingvisto	lingvistiko	(beletristo)	beletristiko
(skolasto)	skolastiko	(gimnasto)	gimnastiko
(botanisto)	botaniko	(mekanisto)	mekaniko
vitro	vitralo	piedo	(piedalo)
notario	sekretario	vikario	(komisario)

NB. — Enkrampaj vortoj ĝis nun ne estas sankciitaj, malgraŭ ilia reguleco.

§ 15. Unu vorto - unu ideo, tia estas ideala principo en semantiko de Esperanto. Kontraŭ tiu principo ŝajne ekzistas t. n. ludvortoj: *romano* (libro kaj loĝanto), *surdiga*, *aĉeta*, *ekskursano*, *kataro*, *koketa*, *teisto*, kma. Sed ili en sia kunteksto, aŭ per sia divideco (rom-ano, roman-o, sur-dig-a,...), ambaŭokaze povas esti tute klaraj. Ankaŭ ne kontraŭ la semantika principo la plursencaj vortoj ekzistas, ekz. kovrilo, ulo, kapo, nesto, ĉeno, dento. Fakte ili estas unusignifaj larĝaj vortoj, kiuj kapablas esprimi plurajn sencojn: *Kovrilo de libro*, *litkovrilo*, *kovrilo de kesto*, *mamulo*, *sanktulo*, *trimastulo*, *terkapo*, *najla kapo*, *geedza nesto*, *aksa nesto*, *montoĉeno*, *kolĉeno*, *ĉeno de amo*, *montodento*, *rada dento*, *dento de segilo*, ktp.

§ 16. Por plenumi sian rolon de intergenta komprenilo, Esperanto devas posedi la espriman klarecon en pli alta grado, ol ĉiu nacia lingvo, kiu estas favorata de la nacia medio kaj senĉesa uzado. La lingvo internacia, uzata malpliofte per homoj de malsamaj lingvokutimoj kaj psikoj, bazas sur principo de pleja klareco-sona, forma kaj ideo. Francaj vortoj «au-dessus» kaj «au-dessous» ne ĉiam estas klare diferenceblaj, precipe por fremduloj; samsencaj Esperantaj vortoj «super» kaj «sub» estas tiurilate pli klaraj.

§ 17. Frazo estas sola reala ero de la parolo, ĉar vortoj, silaboj, literoj, sonoj estas analize senvivitaj elementoj, objektoj de intelekta laboro. Frazo, en larĝa senco, estas unueca komplekso, kiu havas finitan senco.

Laŭ sia formo la frazo povas esti unuvorta, aŭ plurvorta. Unuvorta frazo estas aŭ interjekcio, aŭ interjekcie azata solvorto, ekz. ordona verbo, montra adverbo, ks. Plurvorta frazo grupiĝas ĉirkaŭ verbo, kiu servas kvaazaŭ la akso. Por konsistigi la frazon la temoj devas surmeti finaĵojn: ĉefrolan *o*, ĝian difinanton *a*, verban finaĵon, ĝian difinanton *e*. Ekzemple:

Lingvo internacia kreskas malrapide. Forte lumas somera suno.

La finaĵoj o, a, e rolas nur sintakse, ne influante la sencon de la temoj; la finaĵo verba povas havigi al la temo la sencon agan aŭ statan, se la temo ĝin antaŭe ne havis. Ekzemple:

<i>Kuiristo tro salis la saŭcon.</i>	<i>Krimulo ponardis sian viktimon.</i>
<i>Se plaĉas, vi sukeru la kafon.</i>	<i>La foriro estis tamburata.</i>
<i>Juvelisto volas arĝenti medalon.</i>	<i>La virtuozo violonis tri pecojn.</i>
<i>Nikelita kupro ne oksidiĝas.</i>	<i>Forĝisto martelas la feron.</i>
<i>Dragonaro sabras la malamikon.</i>	<i>La patro ebria bastonas fileton.</i>

La ses verbaj sufiksoj povas, per finaĵo a, formi aŭ difinanton de ovorto: (*vivanta lingvo*), aŭ temanton de helpa verbo: (*estis farita*); per finaĵo o ili formas, plej ofte, la personvortojn: *amanto, mortinto, savonto, amato, delegito, balototo*,...; per finaĵo e ili formas ne adverbojn, sed apartajn tempoformojn, oportunajn por ligi du frazojn:

Paŝante sur la vojeto, li ekvidis en malproksimo la domon... t. e. kiam li paŝadis sur...

Adiaŭinte miajn gepatrojn, mi foriris el la hejmo... t. e. post kiam mi adiaŭis miajn...

Parolonte pri nia movado, vi ne tuŝu la klasbatalon... t. e. dumvi parolos pri...

§ 18. Versofarado en Esperanto bazas sur alternado de la silaboj, kies nombro kaj akcento prezentas regulan kaj precizan difinitecon, propran por ĉiu versospeco: jambo, trokeo, daktilo, amfibrakto, anapesto. La ritmo estas esenca principo de la versado.

Malplifacilaj por la poeto, sed pli belaj, estas la versoj kun rimoj. Senartaj rimoj («malkaraj» aŭ «adasistaj») ripetas sufiksojn, ilin evitas la bona gusto.

§ 19. Celo de ĉiu lingvo estas oportuna interkompreno. La interkompreno postulas egalan uzadon de la lingvo; ĉiu lingvo do emas konserviĝi sensanĝe, ĉar la tradicia inerteco, kiu fidele ripetas la malnovaĵojn, garantias daŭran interkomprenon. La novaĵoj ja aperas ne ĉie samtempe, sed nur en unu aŭ en alia loko, klaso, grupo, por poste vastiĝi en la lingva sfero. Tial ĉiu novaĵo unuatempe rompas la egalecon de la lingvo.

§ 20. Kreskado de ĉiu vivuzata lingvo konsistas ĉefe en du procesoj: unue ĝi pliriĉigas la vortaron, due ĝi plibonigas la formaron. Per la unua ĝi nur pligrandigas la vortamason, per la dua ĝi ŝanĝas elementojn, forĵetante la malnovajn, kreante la novajn.

Dum la unua periodo de nia movado (1887-1904) oni ĝenerale kredis, ke Esperanto povas nur aldone kreski, sed neniam aliiĝi en sia jam akirita formaro. Tion kredis la unua generacio da esperantistoj, kiuj ne estis kapablaj plene transversi sian kredon en la duan generacion, ĉar ĉiu generacio volas esti mastro de sia tempo. La nuna generacio havas iom alian

ideon pri la kreskado de Esperanto, ideon ankoraŭ sufiĉe konservativan. La sekvonta generacio certe havos siajn ideojn, aliajn ol la antaŭaj. Sed ĉiu vivpova lingvo senĉese adaptiĝas al la ĉiam variaj kondiĉoj de la vivo. Nia vivo ĉiam ŝanĝas, do nia lingvo ankaŭ senĉese ŝanĝas, eĉ kontraŭ nia volo.

Interdependa adaptiĝo de Esperanto al la internacia vivo (senĉese varia) estas la evolua principo, kiu pli kaj pli libere funkcias en nia lingvo.

(daŭrigota)

P. STOJAN, L. K.

Listo de verkoj ricevitaj por la XII Floraj Ludoj

(daŭrigo)

54. Ĉien flugu, esperantistaro, kiel flugas ĉie papiliaro. — 55. Returnen-Antaŭen. — 56. H. W. S. 323. — 57. Por la bono ne ekzistas nacia limo. — 58. Amb la llum del teu mirar, has omplert la meva vida. — 59. Laboru senĉese, ne zorgu pri fin! La tombo atendas ne verkon, sed vin. — 60. Nur estas la spirito, kiu vivigas la mondon. — 61. Zuiderzee. — 62. Kompreno estas vojuono. — 63. Mi faris mian aferon kaj atendoj ceteron. — 64. Ne venas honoro sen laboro. — 65. Malsaĝulo. — 66. Per Esperanto al Dio. — 67. Ne faru frazojn pri la vivo, sed penu ekkoni ĝin. — 68. Infano — jen la plej bela elpensajo. — 69. Kaj tamen... nia fina celo estas ja — la Morto. — 70. Kio en la koro sidas, la vizaĝo perfidas. — 71. Plej granda potenco, kuŝas en la komenco. — 72. Bone tiu sidas al kiu la sorto ridas. — 73. Ho Emeŝu! — 74. La okuloj perfidas la animon, sed ne ĉiu scias en ili legi. — 75. Bele estus! — 76. Papilia Ludo. — 77. Virino kiu neniam perfidos. — 78. Radio per Esperanto. — 79. Memorare novissima tua... — 80. Aglo blanka. — 81. Kiu deziras efikon, tiu uzu rimedon. — 82. Seniĝi estas ĝui. — 83. Polvo kaj ombro ni estas. — 84. Museto. — 85. Printempo venku. — 86. Ĉiam antaŭe kaj antaŭen. — 87. Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas, hodiaŭ ni preĝas. — 88. Ĝiĝs. — 89. Kio estas la plej dolĉa? La Dormo. — 90. + + + — 91. Nenio estas tiom stranga, ke ĝi ne povu fariĝi — vero. — 92. Belaĵo estas ĝojo por ĉiu. — 93. Tradukoj estas kiel virinoj. — 94. Por la XX^a. — 95. Ĉiam antaŭen — Saaz. — 96. Multaj idiomoj: milito! Unu lingvo: paco!! — 97. Hacibalo kaj Scipiono. — 98. La sinjorino kun la ŝkarlata masko. — 99. En la infero de l' milito. — 100. En la sankta nokto. — 101. Kabe. — 102. Babilado. — 103. La boremo. — 104. Kredo. — 105. Ruzo. — 106. Miraklo. — 107. Historio. — 108. Rapido. — 109. Tales of the Crusaders. — 110. Per flugiloj de subtila etero. — 111. En la mondon venis nova sento. — 112. Mi ne povas esti profet, en malgrandigita patrujet', Ne, neniam. — 113. Homo devas pensi ne nur pri siaj rajtoj, sed ankaŭ pri siaj devoj. — 114. Ĉu la muziko efektive malkaŝas nian animon? — 115. Ĉu amo devigas? — 116. Honny soit qui mal y pense. — 117. The moon. — 118. Ho mia file! tiom belblondula... — 119. Dies irae dies illa... — 120. Ni hi són tots els que ho són, ni ho són tots els que hi són. — 121. Paŝo post paŝo. — 122. La bonuloj estas ĉiam la gajuloj krom pro malbonŝanco. — 123. Lunhela nokto. — 124. Atakema. — 125. Erri guzietan tokionak badira; bañan biotzak dio: zoaz Euzkalerrira. — 126. La sezonoj. — 127. La morto de patrino. — 128. Dofofo. — 129. Nomina sunt odiosa. — 130. El floroj la abel', alportas ion al la ĉiel'. — 131. Popoloj devas fariĝi al centro celantaj eroj de unu homaro por nia lingvo Esperanto. — 132. Sub la sankta signo. — 133. Vintra suno. — 134. Moraleco ĉiam moraleco. — 135. Junulo.

Kristnasko sub la neĝo

«Ĉu avo, ankoraŭ tre longa la voj' ?
 Lacego min venkas, tro premas malĝoj' .
 Nenie kompreno, nenie kompat' ,
 Kaj ĉiam pli akre turmentas malsat' .
 Pro kio hodiaŭ nur ĉie rifuz'
 por nia muziko kaj kanta amuz' ?
 Ja portis monerojn antaŭe la lud' .
 Hodiaŭ nur grumblo pri ĝena altrud' » .

Ekkaptas la avon profunda dolor' .
 Pri l' plendo infana premiĝas la kor' .
 «Indulgu ni ilin, forestu koler' ,
 Ja estas venonta kristnaska vesper' .
 Kaj tial la homoj pro multa farad'
 Ne aŭdas la gurdon ludanta sur strat' .
 Pro l' fest' okupiĝas ja ĉiu doman' . —
 Ja venos ĉinokte kristnaska infan' » .

«Kristnasko! Ho, preskaŭ pro troa korve'
 Forĝesis mi tion, sed venos — ĉu ne? —
 La Sankta Infano ja ankaŭ al mi,
 Ja bona mi estis kaj preĝis al Li.
 Kun pupo Li venos kaj ludoilar' ,
 Ĵus kiel laŭtare, post longa prepar' ,
 Gepatroj min vekis; kun ĝoja ekkri'
 Brilantan arbeton admiris nun mi» .

Malĝoje la viro rigardas al ter' .
 Pli sangas la koro pro troa sufer' .
 «Gurdistojn, mi timas, migrantajn sen cel' ,
 Ne trovos, ho ve, la kristnaska anĝel' .»
 «Ho, tamen! Patrinjo ja estos gvidant'
 Kaj montros la vojon al mi en fremdland' ,
 Ŝi jen de l' ĉielo ja zorgas pri mi,
 Mortante ŝi tion promesis al mi.»

Sin streĉas la avo malforta al rid' ,
 Rigardas ĉielon kun firma konfid' .
 «Do preĝe leviĝu refoje la man' :
 Ne volu forgesi nin, Dia Infan' .»
 «Sed nun, kara avo, ne povus mi plu,
 Malgranda ripozo jam estus ekĝu' .»
 «Do faru! Ja estas sur tiu vojrand'
 Sufiĉe da loko por laca migrant' .»

Ripozas jam ili sur neĝa vojbord' ,
 Kaj ilin forlasas nun lasta la fort' .
 Fermiĝas okuloj en dolĉa dormad' .
 Neĝeroj surŝvebas kun milda kompat' .
 Du knaboj alkuras post mira ekvid' .
 «Ja dormas gurdisto kaj dormas la id' ,
 La gurdon ludigi, hej, ĝuo por ni.»
 Eksonas jam dolĉa kristnaskmelodi' .

La viro maljuna kun mira avid'
 Muzikon ekaŭdas, feliĉa kun rid'
 Ĉiele sin vidas, forŝvebas la ter' ,
 Jam ne plu turmentas malhavo, sufer' .
 L' infano sin vidas en dolĉa kviet'
 Ĉe patro, patrino sub festa arbet' ,
 Anĝeloj alŝvebas de l' alta ĉiel'
 Ĝojkante. Ho, kia brilego kaj hel' .

Forkuris la knaboj pro jama enu' .
 Dormantojn atentis neniu nun plu.
 Kaj nur kamparanoj dum frua preĝir'
 Ekvidas la paron sub neĝo kun mir' ,
 dormantan ankoraŭ en dolĉa kviet' .
 Ne helpas vekigi eĉ multa rimed' .
 Forprenis jam ilin kristnaska anĝel'
 Por festi kristnaskon en bela ĉiel' .

CHR. THOMA

Premiita en la XIaj. Internaciaj Floraj Ludoj.



Pro... kaj Por...

Internacia Medicina Revuo depost januaro 1926 estas eldonita sur tute novaj bazoj. Ĉefredaktoro: Profesoro Vanverts el Lille. Kunlaborantaro el ĉiuj landoj. Enhavo: originalaj artikoloj; aŭtoferatoj; reformatoj; komunikaĵoj de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Diversaĵoj. — Abono: I Doloro, aŭ samvaloro. — Pri sciigoj, sendo de dokumentoj, k. t. p., sin turni al Redakcio kaj Administracio: D-ro. Briquet, rue de la Bassée 31, Lille (Franclando).

Avaĵo

La avo manlaboras.

Ĉu vi eble malŝatos la avon pro tio, kara legonto? Estas ja kleruloj, kiuj juĝas la manlaboradon malhonoriga. Ĉu vi do mokridos pri la avo manlaboranta? Li ankaŭ ridetus pri vi, kaj estus prava, bedaŭrante vin, kiu ne konas la ĝojon, estigi per la manoj utilan aŭ belan aĵon, vidi kaj palpigi, vidigi kaj palpigi al la konatuloj, kion sukcesis ellabori, kune kun la pensema kapo, la ĝustevida okulo kaj la lerta mano.

Malfeliĉa la homo, kiu ne konas tiun ĝojon!

Sed kion faras la avo?

Unuvorte direbla tio ne estas. Se do la tempo mankas al vi, mi salutos vin adiaŭante. Se vi male bonvolas indulgi babilemon, aŭskultu!

Baldaŭ Kristnaskos.

Vi eble ne konas la tutan signifon de tiuj du vortetoj. Mi ja skribas Esperante. Por esti nepre komprenota, mi devus verki tion germanlingve aŭ uzi alian nordan lingvon.

Kristnasko! tute komprenata tiu vorto nur estas en la malvarmaj landoj.

Kie la vintro neĝkovras la teron kaj la tero spite la senfoliigan froston kreskigas piceon kaj abion, la nordajn vintroverdaĵojn.

Kie, antaŭ ilia kristaniĝo, la praavoj festis la plej mallongan tagon, la ĝojigan tagon de 1^a lunreveno.

Kie nuntempe, la kristanaj pranepoj de la iamaj Diaradorintoj, eĉ la plej malriĉaj havigas al si je tiu festo, pli malpli grandan abion (aŭ piceon). la Kristnaskarbon, ornamas ĝin per ruĝvanganaj pomoj kaj nuksoj orumitaj, per ĉiuspecaj brilajetoj kaj koloraĵoj, sed precipe per aro da vakskandeletoj, ekbruligotaj, kiam la dudek kvara de decembro mallumiĝos.

Jen eklumas la lumigiloj, unu post la alia, vidigante en la malgranda ĉambro pecon de stelĉielo, flarigante, kune kun la rezinaj folioj kaj eble ekbrulanta branĉeto, parfumon samtempe maldolĉan kaj dolĉan, la Kristnaskan parfumon, kiu, pli ol ĉio, memorigas la nordlandanon pri la belaj infanĵaroj.

Nun la patrino, ekbruliginte la lastan kandeleton, sonigas arĝentesonan tintileton; la pordo malfermiĝas kaj silentege, kvazaŭ la ĉambreto estus preĝejo, eniras la infanaro kun okuloj pro ĝojo pli lumaj ol la arbo festornamita, mirante la brilegon kaj kaŝeserĉante la donacaron sub la verdaj branĉoj.

Hol infanokuloj spegulantaj la Kristnaskabian lumon! plej bela brilo. Kiel en liaj manoj, ankaŭ en liaj okuloj vidiĝas Kristarbornamo.

Jam li antaŭvidas la genepan kaj postvidas la gefilan ĝojon pro la beletaĵoj memelpensitaj kaj memellaboritaj, ĉe neniu alia Kristarbo vidataj.

Sed kial do li deziras apartan ornamon? ĉu, kiel la poeto Horacio, li «malamas la profanularon?».

Hol ne, li nur malŝatas la malbelon kaj — atentu!

Ĉar la gusto de la infanoj estas infaneca, nepensemaj plenkreskuloj

juĝas ĉion sufiĉe bona kaj bela por ili, malatentas sian devon, ĉiurilate eduki la etulojn. Tial la Kristnaskabio estas ofte malbonguste ornamata.

La avo grumbladis, kiam li vidis tian plendindan arbeton ŝarĝitan je strangaj objektoj, ofte malbelegaj, ĉiam nepre malarbaj, kiel li diri kutimis. Jen, ĉiaj hejmaĵoj kaj eksterhejmaĵoj, lampoj kaj horloĝoj, bildoj, eĉenkadrigitaj, bicikloj iam, nun aŭtomobiloj, vaporsipoj kaj flugmaŝinoj, tutaj tutaj vagonaroj, blankaj neĝhomoj kaj nigraj kamenskrapistoj kvazaŭ ekzekutite pendantaj je branĉo—ĉu do la Kristarbo estas, kiel bildlibro, vidi-gonta ĉiun formeblan aĵon?

Ne la bruegan urban vivadon ĝi devas reestigi en la vintra nokto, sed la vidon de printempa aŭ somera arbaro. Ĝin do ornamu, krom la lumsteloj, floroj kaj fruktoj—eble eĉ neabiaj, ĉar okazas la Kristnaska mirnokto—vivigu ĝin bestetoj, kiauji oni vidas en la arbaro, petolema sciuro aŭ grand-okula grilo, sed precipe birdaro, kiun la infanoj ŝatas, ĉar illa animo, kiel la avo diras, estas pli birda ol homa.

Ankaŭ lia fileto, antaŭ kelkaj jardekoj, amis la birdojn. Ĝojkriante li montris ilin en sia bildlibro kaj en la patraj scienclibroj, promenante li vidis kaj aŭdis antaŭ ĉio la flugeman kantistaron. Pro tio la patro decidis birdornami la Kristnaskabion.

Sed kiel? pentri la estaĵojn sur papero kaj eltranĉi—arbon ĉiufanke ri-gardotan malbele ornamus tiaj plataj paperpecoj. Korpaj estu liaj birdoj aŭ ne estu! Ĉu li do pafos kaj pajloŝtopos fringon kaj kardelon, paruon kaj buditon, la karajn heroldojn de l' Reĝo Printempo? ho ne! El ligno skulpti ilin estus malfacile, tempuzige, kaj, tro multpezaj, la aĵoj malbele klinigus la branĉojn de l' abio.

Longe la ornamemulo pripensadis la problemon kaj provadis kaj malsukcesis, refoje provis kaj obstine penadis, kaj fine sidis sur la malhela arbo kaj flugŝvebis tra la verdaĵo birdetoj, korpaj birdetoj, vidindaj de ĉiuj flankoj, kolorriĉaj, plume senpezaj, ne fleksante la plej maldikan branĉon.

Ho! la surprizo de la infanoj pro la «pepipoj!» la gaja ĝojpepiado ĉir-kaŭ la vivigita arbo! kaj la fiera kontenteco de l' artisto!

Ĉiujare je la lumo kandeletara reaperis la mirajetoj ofte plimultigitaj kaj plibeligitaj.

Ĉiujare—ĝis kiam, bruligonte la urbojn kaj mortigonte miliojn da homoj, la Mondmilito trapaŝis la pacan valon; ĝi tamen nur piedfrapegis la ĝardenon, disĵetis la posedaĵojn, militigis la filojn, malliberigis la patron.

La havaĵo estas perdita, la groŝoj ŝparitaj senvalorigis, la vivrimedoj ne plu sufiĉas. Sed okazis revido de ĉiuj familianoj, dum multe da konatu-loj funebras. Do supren la kapon ne plendu!

Pri la perdo de l' komforto la avo konsoligis; sed kiam la nenjo komencis promeni kun li kaj miri la belan naturon kaj ĝoĝi pro la fringoj kaj hirundoj, li bedaŭris la forigon de l' Kristarbornamo Li provis reestigi ĝin, sed, kiel antaŭ tridek jaroj, la unua provo nepre malsukcesis; la fingroj estis rigidigintaj.

Sed nun li scias almenaŭ, ke lia ideo estas efektivebla, li spertis la kielon. Li do aĉetas, por kelkaj spesdekoj, diverskoloran maldikan paperon, metalfadenon kaj gumon; el kruda brulŝtupo, per poŝtranĉilo, li faras ilojn, kaj pacience li nun formas eron post ero. Jam birda torso, delikata beko kaj kapo, maldikaj flugiloj kaj «fere» fortaj kruretoj, koketa vosto kaj gaja karbonigra okulparo. Pli malpli laŭnature, sed neniam malnature, li kunigas la partojn; jam vidiĝas nova birdspeco, blua kaj flava aŭ blanka kaj rozkolora, kun ruĝa koro aŭ verda stelo sur la brusto, kun vosto hirunda aŭ budita, kun longaj pintaj aŭ larĝaj mallongaj flugiloj, kun beko pirole dika aŭ silvie delikata; nemoveblaj la bestetoj, ne tamen rigidaj ili ne forflugas, sed ŝajnas forflugontaj, kanton nek aŭdas nek aŭdigas, sed levo kaj turno de la kapeto ŝajniĝas ilin ĉu ekkantontaj ĉu aŭskultantaj la rigardanton.

Ĉiam novaj formoj, aliaj sintenadoj, diversaj koloraroj; la avo estas nelacigebla kaj la kreskantano aron li karesas per la okuloj, pli per la genepaj ol per la propraj.

Ĉiutage, matene kaj posttagmeze, vespere ĝis post la mezo de la longa vintronokto, li tranĉas paperon, kunluas kaj glatigas, formas kaj ŝanĝas, forgesas ĉion, krom la vizitoj al la nenjo. Sed kiam li laŭkutime promenigas la etulon, neniu fringo preterflugas, neniu merlo saltetas sub la arbetaro, ne montrite de la gvidanto al la gvidata birdadmirono.

Kaj li mem pli atente ol iam antaŭe rigardas la vivulon, pristudas la konturon de la fluganta, la movadon de la saltanta petolemulo kaj, hejmen reveninte, li malfermas la grandan skatolon, la birdejon (bonvolu ne nomi ĝin birdujo!), refoje aliigas ion kaj formadas, strange kunlaborigas zorgeman naturobservon kaj senbridan fantazion.

Jen, la paro fariĝas dekduo kaj la dekduo trideko; lin ĝojigas ankoraŭ pilgrandigi tiun nombron. Eĉ kvindeko, duona cento, ne estus sufiĉa: li aliĝas almenaŭ unu, ĉar tri arbojn li estas senpartie ornamonta.

Kion diris la etuloj?

La pli juna diris nenion; sesmonata, ŝi ne jam parolas, sed ŝi ĝojegis pro la lumoj tra la arbo. La dujara, ĝuste dujara Krinjo malsanetis, sed la kuracisto dankinde permesis, ke ŝi ĉeestu la festeton sur la brakoj de plenkreskulo; tial la avo sentis ŝian ĝojtremon, kiam ŝi ekvidis la unuan «pepi-pon» kaj duan kaj ankoraŭ kaj ankoraŭ... ŝi kaj la pliaĝa frateto baldaŭ estis trovintaj ĉiun birdeton, ĉu nevidebla fadeno ĝin flugŝvebigis, ĉu feraj piedetoj ĝin fiksis al iu branĉeto. La plej aĝa el la kvaroj, la jam lerneja knabineto festis malproksime, festis la unuan fojon sen la avo; sed la patrino rakontis al la avo, ke Analizeto (Ano Elizabeto) pleje ĝojis pro la sciiĝo, ke sur la arboj de la gekuzoj troviĝas similaj birdoj.

Sekve pri la sukceso de sia manlaborado la avo estas nepre kontenta; sed kial de post la Kristnaska festo, kiam la tagoj ekplilongiĝas, li daŭrigas la birdestigon?

Kial do, je bela tago, li elektas el la avo la plej beletan trion, zorge ĉir-

kaŭvolvas ĝin per papero, metas en skatolon, aligas skribaĵon kaj forportas la paketon al la poŝtoŝeĉejo? Al kiu la sendo?

Malproksime, trans la Blua Maro, en la Ora Insulo, Florludoj estas okazontaj. Nek la reĝino de tiu bela festo nek la juĝontaro de la gaja batalo estas konata de l' avo; neniam, bedaŭrinde neniam, li vizitis la Katalunan Landon de Suno kaj Floroj. Sed li scias, ke la festontoj estas samideanoj; el la malproksima provinco de Esperantujo li jam ricevis leterojn kaj kaploke estis skribite: karega amiko.

Florludan premion li jam atingis; kial do li ne estus refoje premiota?

La naturan floron li certe ŝatus, li ĝojegus oferi ĝin al la plej ĉarma el la ĉarmegaj, pro beleco gloregaj Majorkaninoj; sed tiun triumfon la blankbarbulo lasos al juna poeto, kiu fervore prikantos la Amon aŭ majstre esperantigos la proponitan katalunan tekston.

Reĝinon elekti la maljunulo ne rajtos; sed vi bonvolu senkulpiĝi la malmolestajon! — ĉu premiota, ĉu ue, li rajtigas sin mem, oferi al la reĝino malgrandaĵon malpli belan sed pli daŭran ol natura floro, paperan birdeton, kiel saluton al la lando de luma suno kaj brilaj floroj el la lando de neĝo kaj malhelaj abioj, al la reĝino de multnacia kongreso, samideanan saluton el hejmo malvasta, sed gaja pro birdoj kaj infanoj.

ED. JUNG

Premiita en la XIaj. Floraj Ludoj



Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

RESPONDOJ AL KONTRAŬRELIGIAJ PAROLOJ de Msgro de Ségur. Laŭ la germana traduko de P. Henriko Müller esperantigis D-ro. Adolfo Halbedl. 211 paĝoj, 19 × 12. Graz 1925. Presita kaj eldonita ĉe «Styria» Unuversitata Presejo kaj Eldonejo. Prezo: ne montrita.

Kun entuziasmo mi salutas la aperon de la konata verko de Msgro de Ségur, kiu nepre postulis esperantigon por ke la katolikoj esperantistaj povu ĉerpi el ĝi multajn argumentojn por pravigi la bonecon de kristanismo.

Fakajn verkojn bezonas nia literaturo por ke en ĝi oni trovu filozofion, teknikon, sciencan, kiujn ĝis nun ni devis serĉi en la nacilingvaj eldonoj.

Grandan dankon ni ŝuldas al la tradukinto kaj eldonintoj, ke ili liveris al ni laŭdindan libron.

«Respondoj al Kontraŭreligiaj Paroloj» enhavas 53 kontraŭparolojn, kiuj elvidigas la specialan ruzon de la verkinto kaj la ne malpli citindan malrespektemon de la tradukinto, kiu kiel la aŭtoro, diversfoje argumentas ridinde kaj senĝene.

Kristanismo, t. e. la katolika religio estas doktrino, kiu nepre devas forjeti la jenajn mallongigitajn argumentojn, se ĝi ne volas forpeli de sia flanko seriozajn homojn:

«Ĉu vi scias, amiko, kion signifas en bona Esperanto la maleleganta diro: «Ne ekzistas Dio». Mi volas doni al vi precizan interpreton; ĝi taksas: «Mi estas fiulo kaj deziras, ke Dio ne ekzistu, ĉar mi timegas lin!»

«Dio ne ekzistas. Ĉu vi konas bonan patron familian, fidelan edzon, ĉastan edzinon, kiu parolas tiel?»

Protestantismo kaj ĉiuj ceteraj multnombraj religioj estas fuŝaĵoj. La katolika religio, konkludas la aŭtoro, estas la sola vera religio.

El lingva vidpunkto la tradukaĵo estas bona. Krom kelkaj eraroj lasta-paĝe ordigitaj, oni trovas nur malmultajn malperfektaĵojn.

Ni esperas kaj deziras, ke la libro trovu multajn aĉetantojn kaj ke similaj verkoj, religiaj aŭ kontraŭreligiaj, blankaj aŭ ruĝaj, rapide multobliĝu en nia kampo, sed bonedukiteco konsilas respekti ĉiun opinion kaj juĝi objektivite, ne kun tia pasio kaj atakemo de D-ro. Halbedl.

ESPERANTA LEGAĴO. — Elektita por komencantoj kaj kursoj. Rakontoj kaj poemoj kun germana interlinia traduko kiel ankaŭ lingvaj kaj literaturaj klarigoj. Esperanto-Germana Biblioteko. Vieno, 1926. 31 paĝoj, 18 × 13. Mendbla de la eldonejo, Paul Knpler, l., Lichtensteg 1. Prezo: 0'50 sv. fr.

Tre taŭga legaĵo por germanlingvaj lernantoj. Tre saĝe elektita enhavo. La stilo de la enhavataj verkaĵoj estas io eksterordinara: ĝi superas ĉiujn postulojn de perfekteco, beleco, eleganteco, k. t. p.

LA EVANGELIO LAŬ SANKTA JOHANO. — Tradukita el la originala greka teksto de Prof. J. Gristead, Dro. S. Lowell kaj Ptro. P. Anderson. Havebla ĉe Esperanta Kolportista Asocio, 64 St. Thomas Road, Finsbury Park. London N. 4. 64 paĝoj, 11 1/2 × 7 1/2. Prezo: ne montrita.

Bele presita broŝureto kun kelkaj gravuraĵoj. Kiel klarigas la titolo mem ĝi rakontas la evangelion laŭ St. Johano.

La lingvaĵo ne estas sufiĉe ĉasta kaj eraroj estas tre oftaj.

DEKLARACIO PRI LA VERO. — Deklaracio fidela pri la Vero elmontrata laŭ la Sankta Biblio (La neerareblaj Skriboj), kaj ne sama kiel la kredo populara, kiu multe konsistas el fabloj, kiu venontajn la apostolo Paŭlo antaŭdiris. (Ĉerpaĵo el la broŝuro). 51 paĝoj, 18 × 12 Senpage havebla ĉe G. R. Martin, 43, Calmont Road, Bromley, Kent, Anglujo.

Laŭ la eldonintoj, la celo de la broŝuro estas: el la Sanktaj Skriboj elmontri ke vane la «kristanoj» adoras Dion, kaj ke la instruadoj de la «kristanaj» eklezioj estas malestimegataj de Dio.

Kiel modelo de malbela stilo la broŝuro povas stari en la unuaj vicoj de fuŝaĵoj. Eraroj ĉiuspecaj abundas en ĉiu paĝo. Se ĉiu eraro estus peko, la eldonintoj certe ne alvenus la Regnon de Dio, eĉ se ili lernigus la Bibliion al la loĝantoj de Marso. — SALJO.

Intershangho — Gazetoj ricevataj

Germana Esperantisto, Monata gazeto por la disvastigo de la lingvo Esperanto, Berlin, S. W. 61 Wilhesstr. 5.

Pola Esperantisto, Monata gazeto de polaj esperantistoj. Widok, 19, Warszawa.

Bulgara Esperantisto, Monata Organo de la Bulgara Esperantista Societo. — Sofio, Bulgarujo, Car Boris, 69.

Kristana Espero, Tampere Satamak, 1. Finlando.

Litova Stelo, Eldono de Litova Esperanta Asocio. Rotuses, Aikštė, n.º 6. Kaunas, Litovujo.

La Suno Hispana, Organo de la hispanaj esperantistoj, Mar, n.º 23. Valencio.

Sennacieca Revuo, Monata Organo de Sennacieca Asocio Tutmonda. R. Lerchner, Colmstrasse, 1, Leipzig — Stötteriz (Germ).

La Nova Tago, Internacia — Baha'ı — Esperanto gazeto. Kvaronjare eldonata de la Esperanto-Komitato de la Baha'ı-movado en Hamburg. — Adreso: F. Gerstner, Wandsbek. — Hamburg. (Germ.) Olmichlemer, 66.

La Fervoĵisto, Oficiala Organo de Internacia Asocio de la Esperantistoj. Fervoĵistoj Jezuitska ulica, 1. Zagreb -- Jugoslavio.

Informservoj de la Internacia Laboroficejo, Tri Komunikaĵoj (cirkuleroj) n.º 94 A. B. kaj C. de la 14^a — 7 — 1925.

Butletı — Rexista, Portaveu del Grup Humanitari Espirita — Pau, Amor i Progrés, Santa Eulàlia, 11, torreta, 5^a—Barcelona (Gràcia).

Revista del Ateneo, Jerez de la Frontera, Duque Almodóvar, 8. Sevilla.

La Taquigrafia, Organo Oficial de la Academia de Taquigrafia de Barcelona. — Palau, 4.

Boletın de la Cámara Oficial de la Propiedad Urbana de Barcelona, Magdalenes, 12, pral.

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Prezo: 12 pesetoj. Aŭfrankite: 2 dolaroj, 11 svisaj frankoj aŭ 9 ŝilingoj. En la Iberia duoninsulo 13 pesetoj aŭfrank.

Por mendoj oni turnu sin al S-ro. Eduard Capdevila, str. Carders, 29. Barcelona.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la KATALUNA ANTOLOGIO estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperantujo.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

“Kataluna Esperantisto”

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkajoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektivegebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anoncon, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston publikigotan.

TAŬGA kaj MALKARA por la LERNANTOJ

Kontraŭ antaŭpago de UNU PESETO
per poŝtmarkoj, ni sendas sortimenton da

DEK EKZEMPLEROJ de ESPERANTAJ
GAZETOJ. (ne aktualaj)

ESPERANTO de U. E. A.

ESPERANTO TRIUMFONTA

KATOLIKA MONDO, k. t. p.

Mendoj: J. HERP

Carrer València, 245 - BARCELONA